# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
J.Miguel García Iturrioz
(jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**OKTOBRO/DECEMBRO 2019** **Nro. 121 (4/19)**




## INTERNACIA E-TAGO.

La 15an de decembro, naskiĝtago de la kreinto de Esperanto, oni celebras la Internacian Esperanto-Tagon, ankaŭ konata kiel *Zamenhof-Tago*. Ludwik Lejzer Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro 1859 en la nuna pola urbo Białystok kaj mortis, 57-jara, en Varsovio, la 14-an de aprilo 1917, kiam ankoraŭ unu el la plej stultaj kaj sangavidaj militoj, la unua mondmilito, ruinigis Eŭropon.

## El "día de Zamenhof" en el Grupo Esperantista de Bilbao.

Como ya es tradicional, nos reuniremos en el Grupo para celebrar este "día internacional del Esperanto" y aprovecharemos para reunirnos con amigos a los que, por desgracia, sólo vemos por el Grupo en este día.

Tras una breve charla, nos juntaremos alrededor de una mesa para dar buena cuenta de la comida y bebidas aportadas por los participantes.

**Día: Sábado 14 de Diciembre**.
**Hora: 19:30**.

**NE FORGESU!: La 14an de decembro, en la E-Grupo de Bilbao, Z-tago**.

## LOKE ...

## JAM EBLAS AĈETI LA KRISTNASKAN LOTERION.




Jam eblas aĉeti la tradiciajn kristnaskajn loterikvitancojn de la Grupo, presitaj tute en Esperanto.

La ĉi-jara numero estas tiu, kiu videblas sur la apuda bildo, t.e., la numero **61.586**. Ĉiu bileto kostas 5 €, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

<u>Je la sendo de tiu-ĉi "Nia Ponto" preskaŭ ne restas biletoj, do rapidiĝu por aĉeti ilin (ne estas ŝerco)</u>.

**<u>Kaj memoru ke ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto</u>**:

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao.
   IBAN-kodo: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **<u>esperantobi@gmail.com</u>** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la biletojn per retpoŝto.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankkonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li aŭ ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al **<u>esperantobi@gmail.com</u>** kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.

**<u>Se puede comprar la lotería de Navidad por internet.</u>**



Para ello:

1. Hay que ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao.
   IBAN: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Hay que enviar un e-mail a **<u>esperantobi@gmail.com</u>** dando cuenta del ingreso.
3. Enviaremos los billetes, escaneados, por e-mail.
4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.
5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a **<u>esperantobi@gmail.com</u>** y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

## CUOTAS DEL AÑO 2019.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una "X", es que **<u>te has olvidado de hacer el pago de la cuota de socio de este año</u>**. El número de cuenta donde hacer el ingreso, así como las cuotas vigentes, están en la primera página de este "Nia Ponto".

**LOKE ...**




## VIZITIS NIN.

La 8an de oktobro, survoje al Santander por partopreni la tiean “Benkontiĝon”, nur por saluti siajn geamikojn, haltiĝis en Bilbao nia kara amiko Echedey, el Kanariaj Insuloj.

Ni ciceronis tra la stratoj de Bilbao, vizitis la gugenhejnan muzeon kaj la malnovan kvartalon de la urbo, por fini en la sidejo de nia E-Grupo.

Sur la foto, li pozas kun Iciar Arteche antaŭ nia sidejo.

Koran dankon pro via vizito, Echedey.

## RENKONTIĜO EN ARROUT (SUDA FRANCIO).



De la 11-a ĝis la 13-a de oktobro, gelernantoj de la nuna kurso veturis al franca urbeto Arrout por partopreni E-kurson.

Instruistoj estis Christophe kaj Nikola.

Sur la foto, la kvar bilbaoanoj (David, Mila, Octavio kaj Igone) pozas apud franca esperantistino, Marie.

## NIA VERDA STELO LUMIGITA.

La vendredon 25an de oktobro, post la klaso, kelkaj laboremuloj sukcesis lumigi la verdan stelon, kiu superflugas la straton de nia sidejo.

Ĝi bele brilis en la nokto kaj altiris la atenton de la preterpasantaj homoj, kiuj tiun tagon je tiu horo amase kolektiĝis ĉirkaŭ la tie abundaj drinkejoj, restoracioj kaj kafejoj.



## KUNVENO DE EŬSKAJ ESPERANTISTOJ.

La regulaj kunvenoj de eŭskaj geesperantistoj daŭrigas kaj ĉi-foje kelkaj eksterbilbaoanoj partoprenos la Z-tagon en nia Grupejo la 14-an de decembro. Do, espereble la kunsido estos pli multnombra ol kutime.

**H.E.F.**

## Nova kurso de Esperanto en la Universitato UNED.

En septembro malfermiĝis denove la ŝancon enskribiĝi en la lingvaj kursoj de la Hispana Ŝtata Universitato por Neĉeesta Lernado (UNED), inkludе, por la dua jaro, de la **kurso de Esperanto**.

En tiu ĉi jaro 2019-2020 eblas denove komenci je elementa nivelo, tiel ke je la fino oni atingas la nivelon A2 laŭ la Eŭropa Referenckadro. La kurso estas tutorigita, neĉeesta, kaj fine, post la koncerna ekzameno, oni atingas oficialan diplomon de la Universitata Neĉeesta Centro pri Lingvoj (CUID) de la UNED.

Jam en la pasinta akademia jaro 2018-2019 okazis la unua eldono de la kurso, kun sufiĉe da sukceso. En tiu ĉi jaro denove Hispana Esperanto-Federacio kunlaboras kun la UNED en diversaj aspektoj, inklude de la fiksado de kriterioj, pretigado de la lernomaterialo, havigo de aldona materialo, selektado de la instruisto, ktp. Ĉiukaze, pri la organizado respondecas la Universitato, en kies retejo eblas kontroli ĉiujn detalojn kaj efektivigi la formalan enskribiĝon.

Krome, HEF-estraro aprobis la kunvokon de **du stipendioj** por junaj lernantoj de la venonta kurso. HEF pagos la duonon de la kosto de la kurso al du lernantoj ĝis 30-jaraĝaj. Oni valorigos akademiajn kaj aktivadajn meritojn, kaj estos nepra kondiĉo ke ili sukcesu la ekzamenojn de la kurso. Interesitoj sendu sian kandidatecon ĝis komenco de novembro al la adreso: kurso@esperanto.es.

*(HEF-retejo. http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco)*

## JUNULARA RENKONTO EN KANTABRIO.




Kiel antaŭgustumo de la venonta hispana kongreso de Esperanto, okazonta en la urbo Comillas, en Kantabrio (al kiu, cetere, eblas jam aliĝi kaj koni aliajn detalojn ĉe: http://www.esperanto.es/kantea/), la junulara hispana asocio HEJS organizis renkonton de junuloj, la t.n. Benkontiĝo 2019, kiu disvolviĝis en Santandero, inter la 10a kaj 13a de oktobro.

*(Nia Voĉo, órgano de Madrida E-Liceo. Oktobro 2019)*

## HISPANA KONGRESO 2020 EN COMILLAS (KANTABRIO).




Memoru ke la venonta hispana kongreso okazos en Comillas (Kantabrio), de la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo. Kaj ke **la 1-a aliĝ-periodo**, kun interesaj rabatoj, **finiĝos la 30-an de novembro 2019**.

Do, rapidiĝu por aliĝi kaj profitu la plej malmultekostajn kotizojn.

Jam kelkaj bilbaoanoj aliĝis, do certe vi ne troviĝos sola inter la amaso da kongresanoj kaj krom la kongreso, vi povos ĝui unu el la urbetoj pli belaj de Hispanio.

## KIAL NE ALIĜI AL HEF?

Hispana Esperanto-Federacio malfermis jam sian novan kampanjon de aliĝo al la asocio por la jaro 2020.

Oni povas trovi la retan aliĝilon ĉe: http://www.esperanto.es/inscripcion.

Oni povas legi kialojn por aliĝi al la asocio en tiu ĉi paĝo: http://www.esperanto.es/hef/index.php/nia-asocio/kial-aligi

Memoru ke nia asocio estas neprofitcela kaj nur kalkulas je la kotizoj de siaj anoj por antaŭenigi la disvastigon de Esperanto. Krome, pro la deklaro de "publika utileco", la kotizoj kaj aliaj donacoj al la Federacio ĝuas altajn fiskajn avantaĝojn. Skribu al admin@esperanto.es se vi deziras koni la detalojn. Ni atendas ĉiujn!

*(Hispana Esperanto-Federacio. http://www.esperanto.es/ )*

Recordamos que la cuota anual de socio de HEF es de sólo 32 euros (30 si se decide recibir “Boletín” en formato digital), con descuentos para los jóvenes de menos de 30 años.

Por otra parte, al ser una asociación de utilidad pública, al hacer la declaración de la renta (**IRPF**), en Bizkaia, se tiene derecho a una **deducción del 20%** de la cuota de socio.

## LETERO AL HISPANAJ EŬROPARLAMENTANOJ.

Fine de oktobro, Hispana E-Federacio sendis leteron al ĉiu hispana parlamentano en la Eŭropa Parlamento.

La celo estis informi ilin pri la nuna lingva situacio en Eŭropa Unio kaj prezenti Esperanton kiel eventuala solvo al tiu problema. Samtempe, oni demandis ilin pri la propra opinio rilate la rolon, kiun Esperanto povus ludi en la vera unuigo de la eŭropanoj. Ĉu ili respondos al HEF?

## KURIOZAĴO: LA ESPERO EN “FLAMENKA” VERSIO.




Certe vi neniam aŭdis La Esperon en “flamenka” versio. Jen ĝi:

“La flamenka kantisto Iván Centenillo, kun gitarakompano de Kiki Corpas kaj manplaŭdado de Curro Andrés, kantas la esperantan himnon "La espero", kadre de la 17a Andaluza Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Granado en 2012, organizita de AEU”.

https://www.youtube.com/watch?v=erz5P-HYw1g

# TRA LA MONDO …

## MORTIS LA NEPO DE ZAMENHOF.



La 9an de oktobro forpasis en Parizo la nepo de Dro. Zamenhof, Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

Kortuŝa homo kun ege interesa vivo, rakontita de Roman Dobrzyński en la libro “La Zamenhof-strato”, tute rekomendinda.

Sur la foto, “La nepo” apud la bilbaoanoj Eduardo Larrouy kaj Iciar Arteche dum la Universala Kongreso de Florenco, en 2006.

## … KAJ ANKAŬ FORPASIS RANIERI CLERICI.



Kun granda malĝojo kaj peza koro mi devas anonci al vi ke hieraŭ, 16an de oktobro, forpasis Ranieri Clerici (1940-2019).

*(Michela Lipari. 17/10/2019)*

Ranieri Clerici estis tre konata de bilbaoanoj post ilia partopreno en diversaj U.K. kaj italaj kongresoj. Li ankaŭ estis en Bilbao dum la eŭropa congreso de la jaro 2004.

## REARBARIGO DE DEZERTOJ EN ĈINIO.




De tempo al tempo necesas montri pozitivajn ekzemplojn. Jen pri la sukcesa grandskala rearbarigo en norda kaj okcidenta Chinio. Bedaŭrinde libereco kaj aŭtonomio de diversaj etnoj estas forte subpremata. Diskuti pri tiaj problemoj evidente ne eblas. Mi esperas ke iam Ĉinio ne nur estos forta sed eĉ kultivos la lukson de libera esprimado kaj religia vivo.

En giganta programo okazis rearbarigo de la randoj de la dezertoj en la nordo kaj ankaŭ en la leusa montetaro de centra Ĉinio. Sukcesoj videblas, ekz-e ke en Pekino ne plu estas sablo-ŝtormoj.

En grandaj areoj – antaŭe sablaj - nun kreskas arboj kaj eblas rikolti fruktojn, krome kreas multajn laborlokojn.

www.infosperber.ch/Artikel/Umwelt/Dank-Aufforstung-praktisch-keine-Sandsturme-mehr-in-Beijing

*(Manfred Westermayer. 22/11/2019)*

# TRA LA MONDO ...

## AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj). **Alternativaj Nobel-premioj**.

Multaj AVEanoj partoprenis la manifestaciojn por protekti la klimaton - entute limigi la altigon de la tutmonda meza temperaturo je maksimume 1,5 °C.

Mi esperas ke estonte UEA kaj SAT zorgos por redukti klimato-hejtigajn eligojn ($CO_2$, ktp), kaj instigas la partoprenantojn de UK-oj kompensi la eligotan $CO_2$-kvanton. Jam interese estas, ke UEA zorgos por interreta maniero partopreni la UK-on en Montrealo.
Kiel kutime ni mencias la premiitojn de la Alternativa Nobel-Premio, sed unue, neforgesinde, ĉar gravas ankaŭ por la rearbariga agado de AVE – du aliaj premiitoj:

1984 **Wangari MAATHAI** (Kenio): ŝi komencis la rearbarigon de arbaro, forhakita de britaj soldatoj, ĉar la arbaro protektis la ribelulojn MaŭMaŭ (kiuj batalis por libereco de Kenio).
Ŝi lernis de sia avino ke arbaro necesas por havi akvon. Krome ŝi aktivis por demokratio en Kenio. 2004 ŝi ricevis la Nobel-premion por Paco. Jen filmo pri ŝi, subtitolita en Esperanto:
http://les-amis-de-wangari-maathai.org/eo/le-film-taking-root/

2018 **Tony RINAUDO** (Australio): li aktivas por FMNR (angle: farmer managed natural regeneration), do, rearbarigo el la radikoj de forhakitaj arboj kaj agrokulturo protektita de arboj. Li komencis tiun agadon en la Sahel-zono antau 20 jaroj. La kamparanoj lernas kiel helpi al la naturo.
https://www.worldvision.de/informieren/themen/umweltschutz/alternativer-nobelpreis-tony-rinaudo

Jen la premiitoj de la „**Premio de ĝusta vivo 2019“ - angle: Right Livelihood Award** (ideo kaj granda donaco de Jakob von Uexkuell): do, por 2019:

**Aminatou HAIDAR** (Okcidenta Saharo): ŝi aktivas sen-perforte por la memdetermino de la popolo de Saharoui en Okcidenta Saharo. Maroko ghis nun ne akceptas. Ŝi estis torturita kaj malliberigita malgraŭ tio, ke ŝi ne aplikis perforton.
**GUO Jianmei** (P.R. Ĉinio): ŝi laboras kiel juristino por la rajtoj de virinoj en Ĉinio. Ŝi sukcese subtenis virinojn, ekz-e pro malleĝa mistraktado en t.n. „Nigra Malliberejo“ (sekreta m.). Ŝi kritikis ke al la nova leĝo (2016) „por protekto de la virinoj“ mankas la aplikado-reguloj.
**Greta THUNBERG** (Svedio): Ŝi verkis premiitan artikolon pri natur-media politiko (tiam ŝi estis 15 jaraĝa), kaj ek de tiam insistis ke necesas pli intensaj agadoj por mildigi la klimatan katastrofon. Dank' al ŝia ideo de „Lernej-striko por la klimato“ ĵus nun okazis tutmondaj manifestacioj, kaj politikistoj iomete pli interesiĝis pri tiu temo.
**Davi KOPENAVA** (Brazilo): li agadas por protekti la amazonian praarbaron, la biodiversecon, la kulturon de tiu granda regiono kiu estas la loĝejo de la pra-enloĝantoj. Li estas ŝamano de Yanomami-indiĝenoj.

*(AVE-Manfred Westermayer. 27/09/2019)*

# TRA LA MONDO …

## FILMO-KONKURSO DE UEA.

**(Vi faras videon, ni donas 100 eŭrojn kaj premion ĝis 500 eŭroj)**

Antaŭnelonge UEA anoncis filmo-konkurson “Mia Asocio, Mia Urbo”, por diskonigi Esperanto-asociojn kaj lokajn kulturaĵojn. Bedaŭrinde ĝis nun alvenis neniu filmo. UEA decidas disdoni 100 eŭrojn kiel subvencion por ĉiu el la unuaj ricevitaj 10 filmoj, kaj ĉiuj filmoj kolektitaj havas ŝancon gajni premiojn.

Por partopreni en la konkurso necesas sendi mallongan (2- ĝis 10-minutan) filmon kun subtekstoj pri sia Esperanto-asocio kaj pri la kulturaĵoj de sia urbo. Necesas sendi ankaŭ artikolon kun informoj pri la asocio kaj la urbaj kulturaĵoj kun ilustraj bildoj aŭ fotoj, **ĝis la 15-a de decembro**. La tri plej bonaj filmoj ricevos tre interesajn premiojn:

1. Senpagan aliĝon al la Universala Kongreso en Montrealo, kie oni prezentos la premiotajn filmojn (aŭ repagon de la aliĝkotizo, se tiu jam estis pagita);
2. Loĝadon en hotelo dum la daŭro de la kongreso;
3. Partan repagon (ĝis 500 eŭrojn) de la vojaĝo. La premioto, kiu ne povos ĉeesti la kongreson, rajtos alimaniere uzi la premian sumon.

Bonvolu vidi la Gazetaran Komunikon de UEA por la detala regularo de la konkurso: uea.org/gk/822a1, kaj spekti la modelajn filmojn faritajn de ĈRI ĉe http://esperanto.cri.cn/other/city/index.html

UEA sugestas, ke vi filmu la urbojn, kie okazis/okazos naciaj aŭ internaciaj kongresoj, kunvenoj, seminarioj, renkontiĝoj aŭaliaj interesaj eventoj.

Kontakto:S-ino Selena <criselena@163.com> kaj Trezoro Huang Yinbao <trezoro@qq.com>

*(Universala Esperanto-Asocio. 12/11/2019)*

## Venontaj E-aranĝoj.

| | |
|---|---|
| 21-27 dec | 7-a Afrika Kongreso de Esperanto. Buĵumburo, Burundo. |
| 27 dec-03 jan | 18-a Novjara Renkontiĝo. Wiesbaden (Germanio). |
| 27 dec-03 jan | Junulara E-Semajno. Głuchołazy, Pollando. |
| 28 dec-01 jan | E-Kulturdomo Gresillon. Jarfino. |
| 30 apr-04 maj | 79-a Hispana Kongreso, en Comillas (Kantabrio). |
| 11-18 jul | 76-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Someren (Nederlando). |
| 01-08 aŭg | 105-UK (Universala Kongreso). Montrealo (Kanado). |
| 22-29 aŭg | Itala Kongreso, en la urbo Assisi. |

25 jul-01 aŭg 2021. 106-UK. Belfast, Nord-Irlando.

Pliaj informoj pri E-aranĝoj en: http://www.eventoj.hu/

**LA “GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO” DEZIRAS TRE SUKCESAN KAJ FRUKTODONAN JARON 2020-AN AL VI ĈIUJ.**